



Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

Simpla : 3 fkoj
Subtena : 5 fkoj
Bonfara : 10 fkoj

} Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajoroj
Epineux-le-Seguain (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagô 4)

1961

2

KULTURAJ KAJEROJ

1961

Marto - Aprilo

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

René Watier
Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesata post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

..

D. Dalmau skribis por vi : Katalunlingva itala urbo.

Esperanto tra la mondo.

TURISMO :

Vojaĝo tra Provenco (F. Garrigue).

Liberaj Opinioj : Penso de pesimisma realisto (M. de Waard).

EL IE EN LA MONDO :

La bovo, riĉaĵo de Madagaskaro (Ramanbazafy-Ralainony).

Tekniko : Tajdo-forto baldaŭ utiligata.

Tra la Esperanta Literaturo : Pal de Lengyel (S. Guillot).

Acoroj (Domingos Garcia).

Fantaziaĵoj : La ruzo (A. Cekov. - Tr. de A. Kofman).

Por Via Distro : Nia konkurso — Amuzaj problemoj.

Ilustrita Rakonto : Senkaŭza timo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

speĝulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Katalunlingva Itala Urbo :

Algero, l'Alguer, en Sardio

Dum la regado de la Barcelonaj grafoj, katalunaj reĝoj de Aragono, inter la jarcentoj XII kaj XVI, ties regnantoj : katalunoj, valencianoj kaj aragonanoj, komerce kaj politike trudiĝis plimalpli en preskaŭ ĉiujn mediteraneajn landojn, inter kiuj la sarda insulo, kies ĉefaj urboj hodiaŭ estas Cagliari kaj Sassari. Proksime de tiu lasta estas la urbeto itale hodiaŭ nomata Alghero, sed katalune, laŭ la popola lingvo, L'Alguer. Iel ajn, ĝia nomo devenas de tiu de la marherbo algo. Ĝia loĝantaro hodiaŭ nombras 25.000.

La regnantoj de la Barcelonaj grafoj restintaj en tiu loko de la itala insulo kvantis tiom, aŭ ili estis tiel fortaj, ke ankoraŭ la popola lingvo tie estas la kataluna. Kaj la enloĝantoj, plej multaj kun italaj nomoj, ĝin parolas kiel propran. Eĉ kelkaj vortoj, kiel **llumins** (alumetoj), kiuj en Katalunujo estas arĥaismaj aŭ malmulte uzataj, en L'Alguer daŭras kiel ordinaraj.

Ĉis antaŭ kelkaj jaroj, kvankam ĉiuj kleruloj bone scias, ke tiu popola dialekto estas kataluna, oni uzis la italan ortografion. Sed en la lastaj jaroj, ĉefe kiam la kataluna lingvo estas malpermesata en Katalunujo por publika instruado kaj oficiala uzo, la algeranoj konsciiĝis pri la graveco, ke ili parolas la lingvon de Katalunlando, de la granda urbo Barcelono. Kaj kelkaj altrangaj algeranoj, kiel la generalo Catardi, la arkitekto Antoni Simon, la advokato Pasqual Nonis, la profesoro Pasqual Scanu, la pastro Fransesc Manunta, la Prezidanto de la « Agrupación Catalana d'Italia » Francesc Nonis, la poeto Antoni Ballero de Candia, venis al Barcelono konstati la impresan fakton pri tia lingva komuneco signifanta ankaŭ komunan historion, kulturon, eĉ parencecon. Ĉi-rilate, mi memoras la kazon de la franca samideano S-ro Saperas, kiun mi ekkonis en Grésillon. La patro, mortinta jam en 1918, en Francujo, kien li iris batali kon-

traŭ la germana invado, estis kataluno ; tial ia filo multe interesiĝis pri Katalunujo, eĉ eventuale por konatigi kun parencoj povantaj rakonti al li pri lia patro. Alia kazo iel rilata al ĉi-tiu, estas mia Barcelona amiko Rebollo, fervora samideano, jam veterano. Li estis galego, veninta al Barcelono, kiam li estis tre juna. En la pasinta jaro, 1960, okazis ke la Hispana Esperanto Kongreso havis sian celebrejon en la galega urbo Pontevedra, li venis al sia nasklando kaj vidis la lokon, kie li estiĝis infano, junulo. Tiam okazon li atendis kun granda iluzio dum tre longa tempo. Post kiam ĝi realiĝis, dum tiu Kongreso, li diris plej ĝoje pro la sopirita atingo, nun mi jam povas morti. Kaj, efektive, li subite mortis ! Nia historio nia pasinteco, nia deveno, certe interesas nin.

En la nuna tempo, kiam oni ne povas plenkatalune disvolviĝi en Katalunujo, okazas pli da kataluna movado eksterlande. Ekz-e, la katalunlingvaj Floraj Ludoj estas celebrataj ĉiujare en malsamlanda urbo : en Buenos Aires, en Parizo, en Londono, kc. Ĉi-jare ili estas organizataj en Algero de la tieaj ĉefaj intelektuloj, kiuj deziras spiri plej profundan kaj superan katalunecon. Ili volas konsciiĝi pri la propra historio, devena kaj lingva natureco. Pri tiu temo jam aperis verkoj de pluraj aŭtoroj. Inter tiuj verkoj elstaras tiu de Pere Català Roca sub titolo « Invitación a L'Alguer actual », kiuj klarigas pri historiaj kaj lingvaj faktoj de tiu urbo, kies loĝantoj sin sentas katalunlingvaj italoj.

En la pasinta jaro okazis gravaj kaj emociaj vizitoj de katalunoj al Algero kaj de algeranoj al Katalunujo ; kaj nun persektivas pli kaj pli intimaj rilatoj inter ambaŭ popoloj samlingvaj kaj malsamlandaj.

DELFI DELMAU.



Esperanto tra la Mondo



LA INTERNACIAJ MANIFESTACIOJ DUM LA SOMERO. — Krom la Universala kongreso en Harrogate, la antaŭkongreso kaj « Seminario Oriento-Okcidento », la postkongreso en Skotlando, oni anoncas en Britujo :

— « Internacia Junulara Kongreso » en Wokingham, 12-19 8. Adreso por informo : 17a IJK de TEJO, Downing College, Cambridge.

— « Internacia Geografia Semajno » en Nottingham, 12-18 8. Adreso : D-ro Richard H. Osborne, Department of Geography, The University, Nottingham.

— Esperanto-Ferio-Semajno, en Krommenie (Nederlando), 13-21 8. Gastigado en esperantistaj familioj. Adreso : S-ino J.A.v.d. Meulen, v. Harten, Popelstraat 13, Krommenie.

— Internacia kongreso de S.A.T., Gent (Belgio) ; 29-7, 4-8. S-ro Albert Bracke, Tulpstraat 52, Gent.

— Perfektigaj internaciaj Esperanto-kursoj, 23-30 7, en Helsingor, Danlando. Skribu al : L. Friis, Ingemansvej 9, Aabylioj.

— ... kaj ne forgesu la Internacian Kulturajn Turisman Renkontigon en la Esperantista Kulturdomo (10-23 7).

EKSPARU POR LA KONGRESO EN TOKIO (1985). — U.E.A. organizis specialan sparsistemon kun diversaj avantaĝoj por eventuale permesi al vi ĉeesti la Universalan Kongreson en Tokio. Detaloj en « Esperanto ».

U.E.A. KANDIDATO POR LA NOBEL-PACPREMIO. — 17 alte kvalifikitaj personoj (ministroj, deputitoj, intelektuloj), de 17 landoj kandidatigis U. E.A. al la Nobel-Pacpremio.

ELDONA KONTRIBUO AL UNESKO-AGADO. — En ligece kun la Unesko-agado pri kulturaj interŝanĝoj « Oriento-Okcidento » U.E.A. prilaboris specialan libro-serion. La unua libro, kiu nun aperas estas « Verkoj de Rabindranath Tagore ». Poste aperos « Kalevala » (la finna klasikaĵo), japanaj noveloj, verkoj el Sud-Ameriko, romano de Sartre, ktp. Jam aperis, en Esperanto, rimarkindaj tradukaĵoj el azia literaturo.

EMINENTULOJ ĈEESTAS ESPERANTISTAN SOLENAJON. — Okaze de la 50-a datreveno de la fonda de la Norvega Esperanto-Asocio, ĉeestis solenajon du ministroj, la urbestro de Oslo, la ambasadorino (esperantistino) de Finnlando.

ESPERANTO KAJ ASTRONOMIO. — Gejunuloj kreis esperanto-grupon sine de la astronomia observatorio de Zagreb (Opatička 22, Zagreb I, Jugoslavio). Ilia komuna verko : « Tragedio en Universo » baldaŭ aperos en Esperanto kaj aliaj lingvoj. Ili ankaŭ ĵus publikigis broŝuron pri la suneklipso.

NASKIGO. — Kulturaj Kajeroj ĝojas gratuli Gestrojn BODE el Kassel (nian peranton en Oke. Germanujo) okaze de la naskigo de ilia kvina infano Maria-Casilda.

INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN WOKINGHAM

La Francoj sin turnu al : F-ino N. BLANC, Lab. Dep. 2, rue Ch-Roy, NEVERS (Nièvre) C.C.P. Orléans 1013-44.

Kotizoj : Membroj de T.E.J.O. :

Ĝis la 1-a de Aprilo : malpli ol 20 jaraj : 104,80 NF. — pli ol 20 jaraj : 110,40 NF.

Ĝis la 1-a de Julio : malpli ol 20 jaraj : 110,40 NF. — pli ol 20 jaraj : 116,00 NF.

La ne-membroj de TEJO pagu 8 NF. pli.

La kotizoj entenas la tutan partoprenon : manĝojn, dormejon, ekskursojn. Antaŭpago de 56 NF, necesa por la valide de aliĝo

Ĉu Kulturaj Kajeroj plenumis niajn rosojn ?

Ĉu vi konsentas helpi nin por la plibonigo de via revuo ?

ABONU

REABONU

ABONIGU viajn amikojn kaj korespondantojn !

Vidu la adresojn de la perantoj sur la lasta paĝo.

La francoj adresu siajn abonojn al :

S-ro MICARD, Kulturaj Kajeroj
Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C.C.P. Nantes 2349-62

TURISMO

VOJAĜO TRA PROVENCO

(Sub tiu titolo aperos serio de artikoloj pri Provenco, iama reĝlando kiu etendiĝas oriente de la rivero Rodano (Rhône) kaj konsistas ĉefe el la rodana delto — Kamargo — kaj el la suda parto de la Alpoj ĝis la Mediteranea bordo.)

I. — KAMARGO

La Rodano estas la limo de Provenco kvan-kam la karaktero de la regiono de Nîmes (okcidente de la rivero) estas tute simila.

Antaŭ ol eniri en tiun veran Provencon iru do ĝis Nîmes por forgesi nian XXan jarcenton, por vivi la horojn de la romia epoko. Lasu por tio vian aŭtomobilon kaj iru piede viziti la romiajn monumentojn kaj la famkonatan ĝardenon de la Fonto. La « kvadrata domo » kaj la arenoj memorigas al vi tiun praan epokon. Se, okaze, via vizi-

to koincidas kun bovkuŝo, ne maltrafu tian spektaklon.

Enirante veran Provencon, iru rekte al Kamargo, stranga tero, sala kaj sovaĝa, naskita de la ŝaŭmo de la mediteraneaj ondoj, lando duonmara, duontera, kie la ĉielo kaj la akvo neniam havas difinitajn limojn, malalta Kamargo, mistera tero ŝanŝigema, lando de la miraĝoj, ŝatata de la veraj kamarganoj : naturamaj verkistoj, ĉevalbredistoj, ĉasamantoj.

Tiu franca regiono tiel diferenca de la aliaj, tro malmulte konata en siaj solejoj, certe allogos la vizitantojn.

De 1942 ĝis nun, iom post iom, rizkulturo invadis la insulon, precipe en la norda parto. Nur kelkajn centojn da tunoj granda en la komenco, la rikolto atingas nun pli ol sep dek mil tunoj kaj sufiĉas por la francaj bezonoj. La metodoj estas tre modernaj, kun aviadila semado. Tiu nova rikolto donas al la lando novan impulson.

Sed, se ni volas retrovi veran, folkloran Kamargon, ni devas iri en la centron mem de la insulo. Tie, lageto Vakares okupas la centran « pelvon » : tre vastan etendaĵon el akvo ne profunda. La bordoj estas kvarmetrojn altaj, la meza profundeco atingas apenaŭ duonmetron kaj nenie pli ol 1,20 metro.

Mallarĝa rubando el sablo apartigas ĝin de la aliaj lagetoj pli sudaj. Tie sidas la fama arbareto « Rièges », flora juvelo de kamargo, kies ĉefa arbo estas la junipero el Fenicio, kiu kreskas nur tie kaj vivas plurajn jarcentojn.

En la marĉa zono inundita nur dum la vintroni renkontas ĉie la saman arbeton : la tamaron.

Dum la somero, sur la senfinaj vastejoj el argilaj aluvioj, multe salaj, belega speciala kreskaĵo adaptiĝas : la salikorno. En provenca lingvo, oni nomas tiajn grundojn la « enganoj » (perfi-dejoj) ĉar dum la malseka epoko oni povas enŝlamiĝi.

La flaŭro estas malalta, preskau senarba, monotona. La aspekto de la lando fariĝas tute speciala, originala.

En la suda parto, apud la lumturo Beauduc (Bodük), la sabloj, forĵetitaj de la maro sude, kaj ĉiam arestitaj de mistralo (forta vento) norde, formas grandegan kampon el moveblaj dunoj, verŝajne la plej grandan de orienta Mediteraneo. Kun siaj movantaj dunoj, tiel grandaj kiel domoj,



Plantado de la rizo



Bovgardistoj en Kamargo

kun siaj majestaj ventoj, tiu regiono estas la plej sovaĝa kaj la plej tragika de Kamargo.

La sovaĝa bestaro faras Kamargon la lando ideala por la ĉaŝo, ĉar krom la apro kaj la kuniĝo, oni renkontas la leporon, la melon, la lutron, la musteleton, la vulpon kaj, unikajn en Eŭropo, kelkajn familiojn de kastoroj, kiuj vivas en la enfluejo de Rodano.

Laŭ la ornitologia vidpunkto, la bestaro de Kamargo estas la plej interesa, tiom per la varieco de la specoj, kiom per la nombro de la individuoj. Situinta sur Mediteraneo, kie alvenas la grandaj vojoj de migradoj, tra la rodanvaloj, Kamargo estas vera paradizo por la birdoj, kaŝo sen bareloj, kie ĉiuj flugbestoj kuniĝas kaj trapasas.

Perdrikoj, koturnoj, skolojoj, marĉaj skolojoj, ĉiuspecaj anasoj, vaneloj, upupoj, ardeoj, gruoj, multkoloraj vespobuteoj, birdoj kaj birdetoj, troviĝas tie.

Sed, la perlo de Kamargo estas la rozkolora fenikoptero, kies unika restejo en Francujo la regiono estas, grandstatura palmipedo, kun stilzobirda sinteno, kies flugiloj ruĝaj kiel fajro kaj nigraj sin desegnas sur la fono hele rozkolora de la tuto. Ĝi vivas en kolonioj sur la grandaj salaj lagetoj. Longaj linioj el ili montriĝas super la horizonto ofte supermezure grandigitaj de la mirado.

Por Provencano, la speciala karaktero de Kamargo, la simbolo de ĝiaj tradicioj, la daŭrigo de ĝiaj kutimoj estas la taŭroj kaj plie la ĉevaloj.

Tiuj bestoj, de tre antikvaj rasoj, havas praepokajn karakterojn. La unua estus la plej proksima devenanto de la uro. La alia aspektas multe, kiel la solutrea ĉevalo. Ili vivas libere laŭ la sovaĝa maniero, kelkfoje po pluraj centoj, koncerne la taŭrojn, sub la gardo de ĉevalrajdantaj bredistoj.

La plej antikvaj kamargaj tradicioj koncerne la taŭron. La du ĉefaj estas la « fermarkado » (provenca lingvo : ferrado) kaj la provenca bov-kuro.

La « fermarkado » konsistas el la demamigado kaj la markado de unujaraj taŭroj. La rajdantaj gardistoj elirigas ilin unu post la alia el la aro. Ili kondukas la bovidon rapide galopante proksimen de grupo de spektatoroj. Tie oni tenas en ligna fajro la markon el fero. Perforte, per magistra frapo de tridento, gardisto faligas la beston, tuj manprenitan kaj tenitan ĉe tero. La posedanto metas en la naztruo de la bovido « muzelon » el ligno por ĝin malpermesi mamsuĉi, tamen permeante al ĝi paŝtiĝi. Oni markas poste la beston per la ruĝigita fero, kiuj stampas la inicilojn de la posedanto. Liberigita, la juna taŭro forkuras, puŝpelante ĉiujn sur sia vojo, je la plej granda plezuro de ĉiu. Sekvas manĝado sur la herbo, akompanata de la kantoj kaj de la vinoj... La festo finiĝas per bovina kuro kutime tre moviĝema !...

La provenca bov-kuro estas alia tradicia spektaklo. En la areno, oni devas elŝiri ruĝan kokardon el rubando de inter la kornoj de la besto. Tiu kokardo estas pli aŭ malpli monpremiita laŭ la klaso de la taŭro.

La kurpartoprenantoj tanĝante la beston, provas gajni la premion. Ili sin savas nur per rapida forkuro ĉar la postkuro de la besto estas senhalta ĝis la barilo ! Dum la bela sezono, de aprilo ĝis oktobro, okazas tiaj spektakloj ne nur en la romiaj arenoj de la grandaj urboj, kiel Arles aŭ Nîmes, sed ankaŭ sur la placoj de la vilaĝoj kie oni konstruas artefaritajn arenojn pere de ĉaretoj, bareloj kaj tabuloj.

F. GARRIGUE.

(laŭ verko de S-ro Crouzet).

LIBERAJ OPINIOJ



(Nur la aŭtoro respondecas pri la suba artikolo. Ni ĝin konsentis aperigi pro tio ke S-ro de Waard estas kara amiko nia kaj ankau pro tio ke lia pesimismo aŭ pli precize la kialo de tiu pesimismo almenaŭ parte klarigas la fakton ke kelkafoje valoraj samideanoj malkuraĝigas.)

PENSO DE PESIMISMA REALISTO.

Esperanton mi eklernis je lundo la 29a de septembro 1930 kaj post kelkaj monatoj mi provis legi revuojn kaj librojn. Penoplene mi elstabis, ke tiuj revuoj de antaŭ 30 jaroj diskutas, eĉ disputas inter si pri gravega temo : la problemo ata-ita !

Estis la epoko de la ekonomia krizo, kiu kaŭzis mizeron en la hejmoj de milionoj da familioj, kies estroj estis senlaboruloj. Do tute pardoninda kaj komprenebla estis, ke ĝuste tiam la Esperantistoj uzadis multan paperon kaj inkon por pridiskuti la ata-ita problemon ! Por la konsterna, senvalgie aktuala romano pri la senlaborula problemo de la Vienano Hans Weinhengst « Turstrato 4 », unua socialtendenca romano originala en nia pruda Esperanto-literaturo, estis apenaŭ intereso.

Nun tridek jaroj pasis, jaroj dum kiuj furiozis tra la mondo infera scensperiga milito kaj ni vivas nun en tempo, en kiu atombombo ĉiumomente minacas detrui ĉiun eron de la civilizo. Mi nun foliumas rezisteme en Esperantaj revuoj kaj trovas en ili... diskuton pri ata-ita ! Ekŝprucas en mi inklino al blasfemo.

Kelkafoje iu provas kredigi al mi, ke la ekstera mondo pli kaj pli ĉesas rigardi la Esperantistaron

kiel aron de naŭvuloj, kaj nun komencas rigardi nin seriozaj. Cu vere ? Cu vere ili, la gesamideanoj-1960-anoj, estas pli seriozaj ol la naŭvuloj-idealistoj el 1890 ? Mi ne jam vidas diferencon, sed mi demandas al mi, inkvizicie demandadas al mi mem : « ĉu la estimataj gesamideanoj neniam maturigos, ĉu ili eterne okupos sin pri sensencaĵoj, neindaj ? » El kia mondo venas homo, kiu ankoraŭ nun misuzas inkon por « verki » pri ata-ita kaj similaj bagatelajoj, harfendaĵoj ?

Se vi, Esperantistoj, sincere deziras, ke la ekstera mondo akceptu vin kiel seriozajn penantojn por inda afero, tiam jam longe venis la tempo por ke vi konduitu seriozaj. Kaj por esti seriozaj urĝe necesas, ke oni ĉesu balbuti « nian karan » lingvon, ke oni ĉesu malŝpari la lokon en niaj revuoj por skribado pri senvaloraj gramatikaj detaloj, kiuj por la praktika uzo de la lingvo havas nenian signifon.

Se multaj kapablaj Esperantistoj forlasis unu post alia la movadon, tiam la ĉefa kaŭzo estas, ke ili enuigis en tiu medio, enuigis pri la seninteresa enhavo de nia gazetaro, enuigis pri la ofte konsterner mallaŭta nivelo de la grupa vivo.

De jaro al jaro la fadeno, iam forte liganta min al la Esperanto-afero, fariĝis pli kaj pli malforta, dafana ; fenomeno kiun mi persone bedaŭris, sed kies klarigon mi ne trovis ĝis nun. La jarfinaj tagoj, periodo tre taŭga por konscienc esploro, revelacis al mi la kialon de mia rezignemo, de mia frostiĝo por afero, kiu allogis min en pli juna aĝo. Ke tio ĉi estu signo sur la muro por ĉiu, kiun ĝi rilatas...

M. DE WAARD.

EL IE EN LA MONDO

LA BOVO RIĈAJO DE MADAGASKARO

Kiel precipan temon, la sigelo de la Madagaskara Respubliko prezentas bovkranion sub Ravenalo (1), ĉirkaŭita sube de du rizospikoj.

Tiu subjekto estis elektita, ne kiel nura artistajo, sed por reliefigi la fakton, ke la bovo estas unu el la precipaj riĉaĵoj de la « Granda Insulo », kies bova brutaro efektive komprenas pli ol 6.000.000 da kapoj.

La madagaskara bova loĝantaro konsistas de cipe el zebuo, besto karakterizita de dorsa ĝibo,

grandaj kornoj kelkfoje lirformaj, haŭtfaldadoj pendanta sub la kolo, felo ĝenerale malhela. Ĝi estis de longe enkondukita de la Araboj en Madagaskaron, verŝajne ĉirkaŭ la naŭa jarcento.

Ekzistas neniu bredmetodo. La bruti libere vagadas en la paŝtejoj, kaj vespere oni enrigas ilin en fermitajn surfacojn apud la vilaĝoj.

La zebuo estas fortika, ĝi adaptiĝis je la klimato de la lando. Ĝi havas tre malmulte da nutraĵo dum la seka periodo (kiu daŭras 3-6 monatojn laŭ

la regionoj), abundajn verdajojn dum la sezono de pluvoj.

Kvankam ĝi facile eltenas tiun alternadon de abundo kaj manko, male ĝia kreskado ege suferas. Ĝi ne frue maturiĝas kaj atingas la plenkreskon nur en malfrua aĝo, pezas 400 kilogramojn nur kiam 7-8 jara (tion facile pezas malpli 4-jaraĝo bovo de plibonigitaj rasoj).

Plie, la inoj estas malmulte laktodonaj, malfacile provizas du litrojn da lakto tage, kiam ĉe supro de produktobleco, apenaŭ sufiĉe por nutri la idon. Tial, kiam la naskiĝo okazas en malfavora sezono, ege suferas kaj rapide mortas la bovido.


En tiaj kondiĉoj, la racia ekonomia ekspluatado de la zebuo estas malfacila. Ĝia esenca estonto estas la viandoproduktado.

De longe la Madagaskaranoj praktikis specialan metodon de grasigado por havi belajn viandajn bovojn. Temas pri la praktiko de la « fosaĵbovo ».

En parketo aŭ tranĉeo fosita en la grundo ĉe la vilaĝo mem, la grasigotaj bovoj estas enfermitaj kaj eliras nur de tie por buĉado. Matene kaj vespere tien oni portas trinkon kaj manĝon, abundan herbon ĉe komenco, al kio poste estas aldonata manio-ko.

Post kelke da monatoj, la tiel traktitaj bovoj atingas egan pezon, havas grandan ĝibon kaj donas altkvalitan viandon.

Tial unu el la plej gravaj zorgoj de la respondecaj aŭtoritatoj de la lando, de ĉiam estis eltiri de tiu senlima riĉaĵo la maksimuman profiton. Plu-



Fosaĵbovo en la merkato de Alarobia-Amboanjohe
(Kliŝo de la aŭtoro).

raj teknikistoj kliniĝis sur tiu problemo, unue por lukti kontraŭ la animalaj malsanoj, due por la kreado kaj plibonigo de paŝtejoj, la kreado de akvejoj kaj putoj. Tiu lasta punkto pri akvo estas aparte grava por la fora Sudo de Madagaskaro, malgrasega, kies klimato estas seka kaj kie en 1959 ondo da sekeco plurajn milojn da bovoj mortigis.

Oni provis plibonigi la rason de la vidpunktoj frueco kaj laktoproduktado per intermiksado kun aliaj rasoj. Tial sinsekvaj enkondukoj de plibonigitaj rasoj estis faritaj en la insulon: Limogia, schwitz, normandia, jerzeja, frieslanda, shorthorn, afrikansa kaj teksas-brama rasoj, kaj ankaŭ la unuaj provoj de Jean Laborde, faritaj ĉirkaŭ 1840, kiuj donis la rason « Rana » kun bona laktoproduktebleco. Ĝi estas konata en la centra regiono, kie nuntempe pli ol 40.000 kapoj ĝin reprezentas.

En la zooteknikaj centroj, la teknikistoj pri bredado studas kaj daŭrigas la intermiksadojn por la plibonigo pri viando, kaj junaj reproduktistoj estas metataj je dispo de la komunumgrupoj en la agrikulturaj centroj.

Pri lakto, kreigas nuntempe en la ĉirkaŭaĵo de la grandaj urboj — Tananarive pli speciale — belaj laktaj brutaroj, kies produkto de lakto estas tre kontentiga. La specialistoj precipe provas elvolvi ĝi la jam atingitajn rezultatojn.

Tekniko universale konata en aliaj landoj estis studita kaj starigita de kelke da jaroj. Estas la artefarita fekundigo, kies rezultato estas nun pli ol 2.000 fekundigitaj bovidoj.

Resume, la plibonigo de la madagaskara bova raso estas do sur bona vojo, sed oni devas konfesi, estas longdaŭra laboro, kaj oni ne povas atendi spektindajn rezultatojn de tago al alia, ĉar ĝi etendiĝas sur pluraj generacioj de bestoj. Daŭraj klopodoj necesas. Plie, tuta partopreno de la bredistoj, de la kamparanaj masoj estas postulita, kaj ilia edukado altrudiĝas. Fakte, ili devas kompreni la celon de la plibonigo: tiel la rezultatoj atingotaj estos laŭdoj por ambaŭ specialistoj kaj bredistoj.

Pro tio la plimultigo de la madagaskaranaj teknikistoj en tiu parto de la ekonomio estas necesa. Ili gvidos la bredistojn, konsilos, helpos ilin, kaj tiel ege servos la landon, ĉar ili partoprenos je la konservado, plibonigo, pligrandigo kaj racia utiligo de tiu senfina riĉaĵo, kiu estas la bova brutaro, kies rolo estas grava en la madagaskara ekonomio.

Car en la nuna situacio de la lando, necesas, ke la juna Madagaskara Respubliko sekvu la paŝojn de la grandaj modernaj nacioj.

RAMAMBAZAFY-RALAINONY.

(1) Noto: Speciala palmo de Madagaskaro, kiu konservas akvon en la bazo de siaj folioj, kaj tiel provizas trinkajon por la vojaĝantoj. Ĝi kovras grandan surfacon sur la orienta parto de la insulo.



TEKNIKO

Tjado-forto baldaŭ utiligata

Baldaŭ komenciĝos la konstruo de baraĵo kaj uzino funkciigata de la tajdo-forto. Ili staros ĉe la elfluejo de la rivero Rance sur la Canela franca marbordo apud St Malo kaj Dinard.

Jam de tre multaj jaroj oni parolis pri tiu projekto sed la planoj estis multaj ĉar ne nur gravas la konstruo sed ankaŭ la funkciigo. Nun la projekto baldaŭ realiĝos dank'al novaj teknikaj ebloj.

Sed vere, kiu energio funkciigos la turbinojn ?

Oni kutime diras, ke tiu energio devenas de la kineta energio de la rotacio de la luno ĉirkaŭ nia planedo. La konskvenco estus, ke la rapideco de tiu satelito iom post iom malpligrandiguĝas kaj, ke, fine, la luno falus sur la teron. Sed fakte tiu elpreno de energio neniel kaŭzos tiun finan falon, kiu nepre okazos post... miloj da jaroj. Ĉar la tajdo-energio estas elprenita el la rotacia energio de nia propra planedo. Sed nia celo en tiu artikolo ne estas klarigi la matematikan teorion de tiu fenomeno. Ni nur diru, ke la rotacimovo de la tero donas tiel grandan kinetan energion, ke se ni povus tute bremsi tiun movon la varmiga energio eligita estus tiel granda, kiel tiu eligita de la brulo de 10 miliardoj da miliardoj da tunoj da karbo. Tiun energion ni ne povas utiligi rekte sed dank'al la tajdo ni baldaŭ sukcesos ĝin utiligi malrekte : la estontaj centraloj funkciigataj de la tajdo-forto produktos energion rekte elĉerpitan el la tera kineta energio. Tiu elĉerpado kompreneble iom modifos la rotacian movon de la

elektro-centralo, kies produktelebla jara energio atingos 20 miliardojn da hor-kiloŭatoj. Sed ĝia konstruo estos ebla nur post la realigo de pli malgrandaj antaŭaj instalaĵoj. La centralo, kies konstruo baldaŭ komenciĝos konsistigos unu el tiuj antaŭaj instalaĵoj pli modestaj. La baraĵo estos konstruita sur la rivero mem kelkajn kilometrojn for de la maro. Ĝi estos 720 metrojn longa kaj ampleksos 450.000 kubajn metrojn. La elektromekanika ekipaĵo konsistas el 24 grupoj, kiuj produktos 544 milionojn da kiloŭatoj po jaro.

La ekerordinara flanko de tiuj grupoj estas la




jena : en la ordinaraj grupoj la elektra generatoro situas super la turbino kaj turniĝas en gasa atmosfero. En la « bulbo-grupoj » la turbinoj kaj la generatoroj estas en la sama ŝelo kaj la tuta situo en la akvo mem ; plie oni sukcesis multe malgrandigi la amplekson de la grupoj kaj konsekvence tiun de la centraloj. Tiun malgrandigon de la grupoj oni sukcesis realigi post multaj provoj ĉar prezentigis multaj malfacilaĵoj. Unue la varmo eligita en elekta maŝino grandigas kiam la diametro de la maŝino malgrandiĝas. Pro tio oni plenigis la maŝinojn per tre fluida minerala oleo. Alia problemo estis malpermesi al la akvo eniri la maŝinojn. Pro la enesto de oleo la problemo reverŝiĝis : estis nun necese malpermesi al la oleo eliri el la maŝino. Sed eliro de iom da oleo estas malpli grava ol eniro de iom da akvo ! Montriĝis ankaŭ, ke la perdo de potenco fare de la movado de la oleo estas ĝime malgranda.

Dank'al Sro Prof. Jean Grimal, kiu de longe studis la problemon de la elektromekanikaj grupoj, la tute speciala koncepto de la bulbogrupa ebligas anstataŭigi la ordinarajn baraĵojn per nura betona « ostaro » en kiu tute libere cirkulas la akvo. Inter la kolonoj oni metas la tute muntitajn bulbo-grupojn.

Vere revolucia estas tiu projekto, kies realigo tre baldaŭ komenciĝos kaj finiĝos en 1966-1967.

(Laŭ artikoloj el diversaj revuoj).



tero ; sed la Rance-centraloj pligrandigos la rapidopendon de tiu movo nur je 0,00000127 sekundo po centjare !

Kial oni elektis la elfluejon de la rivero Rance apud la fana Monto Sankta Mihaelo ? Ĉar en tiu loko la amplitudo de la tajdoj estas iom pli granda ol 6 metrojn — do la diferenco inter la malalta kaj la alta tajdo estas 12 metra. Estis projektita giganta

TRA LA ESPERANTA LITERATURO

PAL DE LENGYEL

Hungaro, presejposedanto, Naskiĝis la 1an de aprilo 1868 en Szabadka (nun Subotica en Jugoslavio) mortis la 4an de oktobro 1932 en Budapeŝt. En sia 4a jaro, li fariĝis tutorfa; edukis lin lia avino. En 1883 li fariĝis presisto. En 1897, li hazarde ekvidis anoncon pri la unua hungara Esperanto-ler-nolibro de Barabas, antaŭmendis ĝin (en kelkaj ekzempleroj, ĉar li esperis, ke ankaŭ liaj amikoj lernos esperanton, sed vane) kaj du tagojn post la ricevo, li sendis leteron al la klubo en Uppsala, kaj korespondis kun P. Nylen. Li baldaŭ fariĝis unu el la plej memofaraj batalantoj de la heroo epoko de Esperanto. La gazeto « Lingvo Internacia » troviĝis en grava krizo kaj Lengyel, presejposedanto en la urbo Szekszad, en 1900-1904 je sia propra risko eldonis (kelkan tempon ankaŭ redaktis) la gazeton. En septembro 1904 li migris kun sia familio al Parizo kaj kunfondis tie la presejon Presa-Esperantista-Societo, kies teknika direktoro fariĝis li mem. Li restis ĝis 1914 unu el la ĉefaj kolonoj de « Lingvo Internacia », konsekvence « fundamentisto » kaj fide-la amiko de Cart. Kiam en 1905 la Lingva komitato fondigis, li tuj estis elektita ĝia ano, kaj en 1910 fariĝis ankaŭ akademiano. Okaze de la militeksplodo 1914 la francaj magistratoj metis lin (kiel hungaran ŝtatanon) en internigejon kaj li restis tie kun la familio ĝis la milifino. Ĉiu havaĵo estis konfiskita, eĉ el la propraj verkoj restis nek unu ekzemplero. Lian kvinjaran suferadon kaj la mizeron foje-foje mildigis la helpo de L. Moreau, Cart, Frechas kaj Holder kaj ankaŭ du esperantistaj soldatoj, trovigantaj inter la gardistoj, faris, kion ili povis fari. En junio 1919 li revojaĝis al Budapeŝt kaj provis rekomenci la vivon kiel ĉefkorektisto de granda presejo. En la postmilitaj jaroj, li ne partoprenis la movadon aktive pro malriĉo, malsano kaj animaj postsignoj de la milit-jaroj. Li verkis du gramatikojn, en 1903 kunlabore kun Schöer kaj Miletz, en 1921 kun Kalocsay. Tradukis hungaren la Fundamenton de Esperanto, 1909, kaj la ŝlosilon de Cefeĉ. Jam en 1809 li verkis la ampleksan « Libro de la humorajo » (dua eldono en 1908); tradukis la rakonton de A. Abonyi « Mallumajo » (1906) kaj kompilis verketon « La Kalendario » (1907). La plimulto el liaj artikoloj aperis en « Lingvo Internacia » (ankaŭ en ties literatura almanako), kaj en la « Juna Esperantisto », kies redaktoro li estis (1904-1914). Artikoloj ankaŭ en « l'Esperantisto », « La Revuo » kaj en « Literatura Mondo », kie aperis liaj interesaj « Rememoroj » (1922 kaj Januaro 1923).

(El Enciklopedio).

— o — o — o —

Jen du tradukaĵoj de Lengyel el hungara lingvo :

FATALA AVENTURO

Barono Barcsay eniris en negocejon de porcelanaĵvendisto, por aĉeti donacon por sia « amata » bopatrino okaze de ŝia morgaŭa nomtago.

En la negoejo li trovis la majstron en tre malbona humoro.

— Nu, majstro, kio okazis ? Vi estas kolera...

— Jes, sinjor'barono. Mia servanto rompis ka-

ran florvazon, ĵus ricevitan, kiu kostis 500 kronojn. Jen, tie kuŝas ĝiaj pecoj; rigardu ilin kaj ĵugu vi mem, ĉu mi ne havas kaŭzon je kolero.

Barono Barcsay longe rigardis la disrompitajn pecojn, dume diabla ideo venis en lia cerbon.

— Majstro, mi aĉetas tiujn ĉi pecojn. Diru la koston.

— Ne moku, via barona moŝto. Kial vi bezonus tiun elbalaŭndajon ?

— Ne serĉu ties kaŭzon, majstro. Mi nepre volas aĉeti ilin.

— Bone ; pagu do kvin kronojn por ili.

Barono Barcsay pagis. Poste li diris al la majstro :

— Volu enpaki la pecojn en lignan keston, Morgaŭ matene mia lakeo venos al vi por forporti la pakajon.

La barono foriris. Reveninte hejmen, li ordonis al la lakeo, ke li morgaŭ alportu la pakajon, kaj, kiam li ĝin enportos en la salomon, li faletu kaj faligu « senintence » la tutan alportitaĵon.

— Nu, pensis la barono, la aferon de la nomtaga donaco mi lerte aranĝis.

La morgaŭan tagon ĉio okazis laŭ la ordono de la barono. La lakeo faligis la keston, kaj oni aŭdis la tinton de la florvazo.

Vekriado de bopatrino, insultoj de barono sekvis.

Barono Barcsay, ridetante en sia spirito je la bone prosperita « arango », malfermis la keston. Ekvidinte ĝian enhavon, li preskaŭ svenis pro malagrabla surprizo : ĉar li terure konstatis, ke la ĝentila komercisto enpakis ĉiun pecon en apartan paperon.

(Lingvo Internacia 1903-1904).

— o — o — o —

LETERO

En teatro, dum la plej bela sceno de l'tragedio, oni devis laŭte legi leteron ĵus ricevitan. Sed ĉar la letero, sur kiu estis skibita la necesa teksto, perdiĝis kaj ne estis trovata ĝustatempe, oni ensendis puran paperon al la aktoroj. La lego estis la devo de la juna heroo. Kiam li rimarkis, ke sur la ricevita leterpapiro nenio estas skribita, li palpebrumis esperoplene al la skatolego de l'sufloro. Sed vane. La loganto de l'skatolego — sciante, ke oni nun ne bezonas lin, ĉar oni antaŭlegas pretekskribitan leteron — malaperis el lia mallarĝa ejo. La espero de nia juna heroo fariĝis malespero, ĉar li ne sciis parkere la enhavon de la letero. Tamen li trovis subite savon. Li donis la leteron al sia estonta bopatro.

— Legu tiun ĉi leteron, kara patro ; mi kredas, ke ĝi enhavas bonajn sciigojn por ni.

La patro ne konfuziĝis. Li redonis la leteron al la junulo kaj diris :

— Legu ĝin vi mem, mia kara filo ; mi forgesis mian okulvitron...

Tiam la junulo donis la leteron al la fianĉino :

— Legu do vi, mia amata Manjo ; mi nun tute ne estas kapabla legi, ĉar miaj okuloj estas larmo-

(Daŭrigo je la paĝo 10a).

ACOROJ

Tiu insularo konsistas el naŭ insuloj, eble restaĵoj de la probabla Atlantido. Ĝi havas nun 300.000 loĝantojn. La insuloj estas de vulkana deveno.

Ĝi entenas tri aŭtonomajn distriktojn, ĉiu kun civilan gubernatoron. Formas la Orientan Distrikton la insuloj Santa Maria (la unua malkovrita) kaj Sao Miguel (la plej grava); la ĉefurbo Ponta Delgada, la nura urbo en tiu lasta insulo havas 20.000 enloĝantojn. Formas la Centran Distrikton la insuloj Gragiosa, Terceira kaj Sao Jorge; la ĉefurbo estas Angra, en la insulo Terceira, kun 13.000 enloĝantoj. Fine la insuloj Faial, Pico, Florei kaj Corvo formas la Okcidentan Distrikton; la ĉefurbo estas Horta, en la insulo Faial, kun 8.000 loĝantoj. La plej malgranda insulo estas Corvo, kun surfaco de 17 km² kaj 800 loĝantoj.

Kiam la portugaloj navigantoj malkovris, laŭ informoj de la Infanto D. Henrique, tiujn ĉi insulojn (1432-1464) ili trovis nek loĝantoj nek bestojn. En 1439, alvenis kelkaj ŝafoj kaj la unuaj loĝantoj (portugaloj kaj flandroj) en 1465.

La vulkana aktiveco estis kelkfoje tragedia en kelkaj insuloj, precipe en nia jarcento, en 1926 kaj 1957 en insulo Faial. La plej grandaj krateroj estas: Sete Cidades (sep urboj) kaj Furnas (kavernoj) en Sao Miguel kaj Caldeira (kaldrono) en Faial (alteco 400 m, kaj diametro 1850 m.) En la malgranda insulo Corvo troviĝas la kratero Caldeirao (kaldrono) kun perimetro 5.500 m.

La insuloj Pico kaj Faial estas la plej proksimaj en la insularo; nur kanalo 5 marmilojn larĝa apartigas ilin. Tage, oni iras de unu al la alia per motorbarkoj.

Pico estas la plej dezerta insulo, pro la erupcioj. Sed la seka klimato estas la plej saniga en la insularo. Ĝia ĉefa industrio estas la balenĉaso. Ĝi precipe produktas: fruktojn, vinon, brandon kaj diversajn legomojn.

La balenĉaso estas grava industrio ankaŭ en insulo Faial. Oni ĝin praktikas en elegantaj kanotoj kun sep viroj. La harpuno estas jetata per la mano, ankoraŭ primitiva sed tre kuraga maniero. Alia industrio estas tiu de tre bona butero kiun oni eksportas.

Horta kaj Ponta Delgada posedas bonege ŝirmatajn havenojn kaj gravajn ŝipprearojn. La unua bazo uzata de la Pan American Airways estis tiu de Horta posedas ankaŭ gravan telegrafstacion, kiu per 14 kabloj, interligas Eŭropon kaj Amerikon.

La plej industria insulo estas Sao Miguel. Tie oni fabrikas tabakon, alkoholon, teon, sukerojn kaj kulturata grandskale ananasojn por eksportado. La kampvojoj en Faial, Sao Miguel kaj ĉefe en Flores (la plej bela) estas mirindaj pro la bluj horten-sioj, kiuj ilin bordas ambaŭflanke.

140 kilometroj apartigas la orientan grupon de la centra grupo kaj 220 km. la okcidentan de la centra. La distanco de Portugalujo al Santa Maria estas 1.400 km. Longa sed irinda distanco, ĉar Acoroj estas pro la mirindaj panoramoj, pro la folkloro muziko kaj kantoj, pro la mildeco de la klimato vere vizitindaj. La delegitoj de U.E.A. en Faial kaj Sao Jorge plezure donos al vi informojn.

DOMINGOS GARCIA.

(Letero : daŭrigo kaj fino)

plenaĵo pro la dolĉa ekscito.

La knabino prenis la leteron. Sed kiam ŝi ekvidis, ke la papero estas pura, donis ĝin al patro kaj diris :

— Tamen estus pli bone se vi legus ĝin patreto. Mi tuj iros en la alian ĉambron por serĉi vian okulvitron.

Kaj ŝi foriris ? La du viroj atendis ŝin, kredante ke ŝi volas serĉi kaj alporti la skribitan leteron. Ili atendis jam longe, sed vane. La knabino, staranta inter la kulisoj, rigardis ilin ridetante.

Subite la patro kolere ekkriis :

— Ho ! mia filino ne trovas la okulvitron. Mi devas iri por helpi al ŝi en la serĉado.

Kaj li, foriranta, metis la leteron en la manon de l'juna heroo.

Post longa, senpacienca, vana atendo subite venis sava ideo en lian cerbon. Li kriis al la foririntoj :

— Envenu, karaj miaj, mi aranĝos saĝe la aferon. Ili time envenis.

— Mi jam tralegis la leteron — daŭrigis la juna heroo — ĝian enhavon mi rakontos al vi morgaŭ. Kaj ili senĝene daŭrigis la ludon.

(Lingvo Internacia 1900-1902).

FANTAZIAĴOJ

LA RUZO (A. Ĉekov)

Tiujn ĉi tagojn ni enterigis la junetan adzinon de nia maljuna poŝtestro Dolĉapipro. Enmetinte la belulinon en la teron ni, konforme la morojn de niaj avoj kaj patroj, venis en la poŝtejon por fari la funebran feston. La flanoj sur la tablon metitaj, la maljuna vidvo maldolĉe ekploris kaj diris : « Kiaj ruĝaj flanoj ! Tute similaj al la vangoj de la mortintino ! Tute same belaj ! Tute same ! »

« Jes », diris la festintoj, « ŝi efektive estis bela... Virino de la plej bona speco ! » — « Jes, ĉiuj miris ŝin rigardante... Tamen, miaj sinjoroj, mi amis ŝin ne nur pro ŝia beleco, ne nur pro ŝia boneco. Tiuj ĉi du ecoj estas alnaskitaj al la virina naturo ĝenerale, kaj ofte renkontataj en nia mondo. Mi amis ŝin pro alia anima trajto : mi amis ŝin, la mortinton (ŝi eniru en la ĉielan regionon !) pro tio ke ŝi, malgraŭ ŝia viveco kaj facillanimeco, restis fidela al ŝia edzo. Ŝi estis fidela al mi, kvankam ŝi havis dudek jarojn kaj mi baldaŭ estos sesdekjarulo ! Ŝi estis fidela al mi, al maljunulo. »

La diakono, kunmanginta kun ni, eligis blekon kaj tuson por esprimi dubon.

« Tion, vi ne kredas ? demandis la vidvo.

« Mi ne diras tion » respondis la diakono embarase. « Se la junaj virinoj estas en niaj tagoj tiel... frandemaj kaj... spicamaj ! »

« Vi estas en dubo sed mi tuj konvinkos vin. Mi subtenis ŝian fidelecon per diversaj peroj. Kiel tion diri ? Per strategiaj artifikajoj. Mia konduto, mia ruza karaktero sukcese faris, ke mia edzino nenimaniere povis malfideli min. Jes, mi praktikis ruzaĵojn, kiuj konservis mian edzecan honoron. Mi scias specialdirojn, kaj sufiĉas fari tian diron, kaj finite ! mi povas dormi sur ambaŭ oreloj. »

« Kiuj do estas tiuj diroj ? »

« La plej simplaj ! Mi trumpetis en la urbo malbonan famon. Tiun ĉi famon vi tre bone konas. Mi diris al ĉiuj : Mia edzino Alena havas liĝon kun nia poliestro Ivan Aleksejĉ Zalinĥvakci. Tiuj ĉi vortoj sufiĉis. Neniu arogantis cirkaŭflirti Alenan pro timo, ke la poliestro koleriĝu. Ĉiu, kiu renkontis ŝin, forkuris senprokraste, por ke Zalinĥvakci ne suspektu lin. Ha, ha ! Vi ja scias ! Apenaŭ oni havus afereton kun tiu ĉi anateminda lipharulo, oni tuj malbenus sian vivon. Oni havus en unu tago kvin monpunojn pro kontraŭsana korto ; apenaŭ li rimarkus vian katon en la strato vi tuj havus malfacilaĵon kun la polico pro viaj bestoj vagantaj sen observo kaj zorgo.

« Sekve via edzino ne estis la amatino de Ivan Aleksejĉ ? » diris mi kun miro.

« Ne, tio estis mia ruzaĵo. Ha, ha ! Kion vi diros nun ? Ĉu mi ne lerte superruzis vin ? »

Tri minutojn ni silentis. Ni sidis kaj sentis ĉagrenon kaj honton pro tio ke ni estis tiel lerte trompitaj de tiu ĉi dika ruĝnaza maljunulo.

« Nu, diablo ! Ĉi ja reedziĝos ! », murmuris la diakono.

TRADUKITA DE A. KOFMAN

POR VIA DISTRO

Nia Konkurso

Jen la du lastaj problemoj de nia konkurso 60-61. Ni petas ĉiujn konkursantojn, ke ili sendu siajn solvojn nepre antaŭ la 15-a de Majo (por la Francaj konkursantoj) aŭ la 31-a de Majo (por la eksterlandanoj). Kelkaj petis la solvojn de la problemoj. Ne estas eble presigi ilin en la revuo sed ni povos sendi ilin al la interesatoj. Ĉiuj konkursintoj ricevos ilin.

UNUA PROBLEMO (20 poentoj)

R O
L A N D
D U
P U I S

Ĉi tiuj literoj formas ne nur la nomon de eminenta franca samideano, sed ankaŭ veran adicon, se oni anstataŭigas la literojn per ciferoj tiel, ke en la loko de la sama litero staras ĉiam la sama cifero.

DUA PROBLEMO (20 poentoj)

	via	ne	te	ro	
ro	kaj	bo	te ?	ni	nes
la	te ?	te	Ho	Ir	mal
es	ko	ran	am	Bru	fla
ĝan	hal	en	la	for	as
via	pe	ti	sen	mo	las

Ĉi tiu ŝak-enigmo kaŝas du demandojn de nia Majstro je kiuj doni jesan respondon (sen konscienciproĉo) estas laŭdinda kaj honorinda virto por ĉiu esperantisto. La enigmo estas solvebla laŭ la movo de la ĉevelo sur la ŝaktabulo.

TRIA PROBLEMO

(nur por dispartigi la ekvalgajnintojn)

- 1) Kiom da personoj partoprenis la ĉijaran konkurson ?
 - 2) Al kiom da nacioj apartenas la konkursantoj ?
- (Ni atentigas vin ke nur la abonintoj rajtis partopreni la konkurson, ke ili estas proksimume 800.

Ne ĉiuj partoprenis... feliĉe por la korektantoj ; sed la nombro de la konkursantoj estis pli granda ol pasintjare.

Sendu viajn respondojn al : S-ro Pierre CHEVALIER, 19, Boulevard Gabriel-Lauriol, NANTES (L.-A.), Francujo.

Ne forgesu indiki viajn nomojn kaj kompletajn adresojn.

Amuzaj problemoj

(de S-ro JARLIER)

Solve de la lasta problemoj : La tri ĵaluzaj edzoj.

Unua solvo : Ni nomu A, B, C la virojn, kaj A', B', C' la virinojn. Pro galenteco nur la viroj remas kaj unue transpasigas la virinojn. Ĉiu edzo veturigas la propran edzinon kaj revenas :
A kaj A' transpasas ; A revenas — A' restas
B kaj B' transpasas ; B revenas — B' restas kun A'
C kaj C' transpasas ; C revenas — C' restas kun A' kaj B'

A kaj B transpasas ; B revenas — A restas kun A' B' kaj C'

B kaj C transpasas ; viroj kaj virinoj estas nun kune.

Dua solvo : La virinoj povas remi same kiel la viroj.

A' kaj B' transpasas ; A' revenas — B' restas
A' kaj C' transpasas ; B' revenas — A' kaj C' restas
A kaj C transpasas ; B revenas — A' A kaj C restas
B' kaj C' transpasas ; C revenas — A', A, B' kaj C' restas.

C kaj B transpasas ; ĉiuj estas nun kune.

NOVAJ PROBLEMOJ

La Piedoj. — En birdokorto troviĝas kokidoj kaj kunikloj : trioble pli da kokidoj ol da kunikloj. Sumo estas 120 piedoj. Kiom da kokidoj kaj da kunikloj vivas en la korto ?

Multnombra familio per malmultaj personoj. — Tiu familio konsistas el : 1 avo, 1 avino, 1 bopatro, 1 bopatrino, 1 bofilo, 3 filinoj, 4 filoj, 2 patroj, 2 patrinoj, 3 nepoj, 2 nepinoj, 4 fratoj, 3 fratinoj, 2 bofratoj, 2 edzoj, 2 edzinoj, 1 onklo, 3 nevoj, 2 nevinoj. Ĉu entute 40 personoj ? Ne, nur 10 ! Kiu do estas la ĝusta konsisto de tiu familio ?



SENKAŬZA

TIMO

Teksto de Petro

Ilustraĵoj de Al. Besson



Lacegaj ĉasistoj revenas post longa irado en la kamparo. Ili ne havis la okazon pafi eĉ unufoje. Ankaŭ Steloto, la hundo, lacegiĝis.



Ili refreŝiĝas en la vilaĝa restoracio. La fungoj estas bonegaj. « Ni esperas, ke ili ne estas venenaj », ili diras. « Manĝu, Steloto, ankaŭ vi bezonas refreŝiĝon. »



Kiel agrable estas ripozi post bona manĝo. Steloto ŝtelo foriris. Subite la servistino alkuras : « Steloto mortis ». La du ĉasistoj ektimegas : « Certe la fungoj estis venenaj ! »



La apotekisto donas al ili kontraŭvenenajn kuracilojn. Ili tuj englutas ilin. Kiom malhongustaj ili estas !



La du ĉasistoj revenis al la restoracio. Ili sin sentas ege malsanaj. Ĉu pro la fungoj, ĉu pro la kuraciloj, ĉu pro la timo ? La ĉambro turniĝas ĉirkaŭ ili.



Al la servistino ili demandas : « Ĉu Steloto multe suferis ? » — « Ne, ŝi respondas, la aŭtomobilo surpasis lin. Li tuj mortis. » La du viroj rigardas unu la alian, konsternitaj.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (20 aŭst. ŝil.).

Belgujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18.

Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (6 ŝil.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (2,5 guld.).

Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (3 mark.).

Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (5 mark.).

Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (40 pes.).

Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (450 liroj).

Itala Esperanto-Federacio, Córso G. Galilei, 22, TORINO.

Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (6 kr.).

Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, Kopenhago K (6 kr.).

Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (30 Złotoj).

Svedujo : S-ro Rune Palmgren, Persikogatan 32 III, Stockholm-VALLINGBY (4 kron.).

Svislando : S-ro Pierre Metivier, Via Ferrera, Ascona (Tes.) (3 sv. Frank.).

Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (11 st.), aŭ respondkuponoj (8 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo